

EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro



Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj









EKO 2023 / 60. Oktobro 24, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler. Tria kontrolanto dezirata.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Alkroĉaĵo: 470 KB. Sume: KB 900.

Rezultoj de AMO 103: virina emfazo

‘Virinoj, kiuj ŝanĝis la mondon’, jen la temo de AMO 103 okazinta en la 19-a de oktobro. La tri ĉefaj prezentaĵoj temis pri virinoj ekster nia movado, kiuj ludis gravan rolon en la monda evoluigo. Sed en sia malfermo kaj enkonduko al la temo, la patro de AMO (kaj EKO) prezentis gravajn virinojn en la Esperanto-movado, pionire kaj nuntempe. Tion ni alkroĉas al la nuna EKO. La cetera programo sekvis:

1. Ermanno Taracchini kaj Laura Barbieri – „Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni, du kuracistinoj kaj pedagog-sciencistinoj, kiuj dediĉis sian vivon al la edukado por nova mondo”. La prezentaĵo estos alkroĉita al EKO 61.
2. Martha Otto - "Lidia Zamenhof, kiu vere ŝanĝis mian vivon". Prezentaĵo pri Lidia Zamenhof, kiu vere ŝanĝis mian vivon. Prezentaĵo pri Lidia Zamenhof, kiu vere ŝanĝis mian vivon. Prezentaĵo pri Lidia Zamenhof, kiu vere ŝanĝis mian vivon. Ni prezentos ŝiajn belajn dirojn en baldaŭa EKO-komuniko. (Lidia aperas en la bildo)
3. Małgosia Komarnicka - "Maria Skłodowska-Curie - simbolo de virina forto"



Sube, vi trovas ligilon al la prezentaĵo de Małgosia Komarnicka pri la vivo de Marie Skłodowska-Curie: (45 minutoj da ludo-tempo). Ĝi estis la unua virino kiu ricevis la Nobel-premion, i.a. pro la kreo de iks-radiaj maŝinoj.

https://www.youtube.com/watch?v=ur9fg_YjiGo

Jen ligilo al la registro de la tuta seminario (ĉ. du-hora). Atentu, temas pri dosiero por la elŭto kun pezo de 288 MB.

<https://fromsmash.com/ddM3Guw5LL-dt>

Alkroĉu mian prezentaĵon post korekto Michela.

Subtemoj de AMO 104 kadre de TAKE

La AMO-seminario okazos en Fortaleza, Brazilo, inter la 2-a kaj 5-a de novembro.

1. Stato de la Amerika Esperanto-Komunumo
2. Kiel efike varbi en la erao de ciferecaj sociaj retoj
3. Kiel efike kunlabori inter la landaj asocioj kaj inter unuopaj Esperantistoj
4. Laborplano por la venontaj jaroj

AMO 105 en Kroatio

Tio okazos novembre kun temo 'Esperanto en la publikaj bibliotekoj' en prizorgo de nia AMO-komisiito, Marija Belošević.

AMO 106 in Lomeo, Togolando

Tio okazos de la 21-a ĝis la 24-a de decembro, kun temo 'Esperanto kaj Mono'.

ILEI en Tutmonda Video Forumo

La 12-an de oktobro mi estis invitita ĉeesti la 11-a Tutmondan Videomeditan Forumon, kiu okazis en Pekino por marki la 10-an datrevenon de la la iniciato 'Zono kaj Vojo'. Mi ĉeestis kiel 'Esperanto ILEI' Alparolis la publikon du ĉinaj ministroj kaj pluraj estroj de komunikilaj organizoj, precipe el Afriko, Arabaj landoj kaj Azi-Pacifikaj landoj. Mi devas diri, ke estis tre interesa, precipe en la parto pri la edukado de ĵurnalistoj kaj pri la interŝanĝo de komunikilaj enhavoj por atingi novajn publikojn, larĝigi la merkaton kaj pliigi la reprezentadon de diversaj kulturoj/malplimultoj.



[10-a datreveno de iniciato Zono kaj Vojo: Kunhavo de amaskomunikila respondeco](#)

Alessandra Madella

Universitatoj en Ĉinio

En la urbo Hangzhou, en la Komunika Universitato de Zhejiang funkcias du Eo-kursoj kun entute 60 studentoj ĉi-semestro. La gvidanto estas juna instruistino ZHU Xueli, kiu doktoriĝis de la Universitato de Zhejiang pasintjare. Ŝi lernis Esperanton kiel nedeviga studobjekto en sia bakalaŭra studo en Zaozhuang-a Universitato, poste ŝi magistriĝis kaj doktoriĝis en la Universitato de Zhejiang.

Ĝuste en la lasta kunkpensado ja ŝin mi menciis. Profesorino Wang, honora prezidanto de Te-amanta Esperantista Organizo (TEO), esprimis sian deziron okazigi Eo-kurson en sia universitato La Agrikultura Universitato de Zhejiang, tamen mankas E-instruisto. Oni rekomendis al ŝi ZHU Xueli, kies universitato estas en la sama urbo. Aparte, la estro de la Instituto, kie ZHU Xueli laboras, estis estro de la profesorino, ili havas tre bonam rilaton.

Post du tagoj mi flugos al la urbo Tianjin, proksima urbo de Beijing, por partopreni la trian forumon pri Teo-kulturo, ankaŭ Profesorino Wang flugos tien, ni interŝanĝos niajn pensojn.

Arko

Koincido de festotagoj en Litovio

Litova Esperanto-Asocio informas, ke vica la 58-a kongreso de Litova Esperanto-Asocio okazos la 16-an de decembro 2023 en Kaunas, kie dum iom da tempo vivis Zamenhof. Samloke post la kongreso la 16-17-an de decembro, 2023 okazos ĉujara tradicia aranĝo de Litoviaj esperantistoj 'Zamenhof-Tagoj-2023'. Pli detalaj informoj pri ambau aranĝoj aperos iom poste. Bonvolu sciigi pri tio chiujn konatajn al vi Litoviajn esperantistojn.

Povilas JEGOROVAS, Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Ligu homajn rajtojn kun la Zamenhofa Tago

Ĉi-jare du eventoj okazos apude, la 75-a datreveno de la Deklaracio de Homaj Rajtoj (dec. 10) kaj nia tradicia Zamenhof-tago (dec. 15). Necesas plani agadojn komunajn por festi la du eventojn kaj informi la neesperantistojn pri tio, ke ni laboras por defendi la homajn rajtojn de ĉiuj. Atendu baldaŭ pli konkretajn planojn.

Renato Corsetti

SMG: Ne nur atendu. Kreu kaj konigu viajn proprajn planojn! Renato kaj mi (por EKO) volonte ricevos viajn planojn. Tia ligo valoras, ĉar ĝi levas la Z-tagan festadon el interna propra festo-celo, kaj portas nin en la ĝeneralan mondon.

Facila aliro al la virtuala kongreso

<https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/4-a-virtuala-kongreso-de-esperanto-r392/>

Germanio praktike helpas en multaj afrikaj landoj

Dum oktobro 2023 mi partoprenis seminarion por instruistoj kaj estroj de lernejoj en okcidenta Afriko (Malio, Burkino, Kamerunio, Niĝero, eĉ unu el Tunizio). Invitis kaj pagis la Germana Evoluohelpa Asocio (GIZ). Ni instruis pri modernaj metodoj de edukado per praktika laboro. Ili elektis la temojn: plibonigon de la grundo, akvopopoliko, mastrumado de akvo. [...]

La enhavo de nia programo por la afrikanoj estas prenata el niaj rutinaj ofertoj de bienoj kaj eblas prezenti en la dezirata lingvo. Ĉar la berlina registaro donacis abundan aparataron por distanca laboro ni povas oferti kelkajn aferojn ankaŭ per ZOOM aŭ TEAMS aŭ alia. Kompreneble ni instruas surloke en Afriko. Aktuale estas la fino de programo kun Mozambiko, kie grupo da instruistoj estis dum du semajnoj kaj preparis analizon de akvo kaj tero kaj pri sunenergio.

Roland Schnell, Berlino

AMU la agadon de la pola universitato

Aperis raporto kun fotoj en la retejo de la Etnolingvistika Fakultato de AMU (kie okazas la postdiplomaj interlingvitikaj studoj) pri la lasta **surloka sesio** (9-15 sept 2023) kaj la **25-jariĝo de de la Studoj**:

<https://we.amu.edu.pl/studia-interlingwistyki-obchodza-25-lecie-na-uam/>

La Dekano, prof. Piotr Nowak akceptas la profesorojn de la sesio: Mark Fettes kiu gvidis kurson pri la *Nuntempaj problemoj de E-movado*, Chris Gledhill kiu pri *tradukakdo*; dr Katalin Kovats kiu motoris la *specialiĝon pri instruado* kaj Ilona Koutny, la gvidanton de la Studoj.

Tuj antaŭ la sesio, Dr Michele **Gazzola** prezentis al la jam alvenintaj studentoj kaj instruistoj de IS la novan libron pri *Lingvopolitiko kaj planado* (Routledge Handbook

of Language Policy and Planning) kiun li redaktis kun aliaj kolegoj. Li ankaŭ alvokis pri publikigo en la revuo *LPLP* ankaŭ kies redaktoro li estas.

<https://we.amu.edu.pl/wyklad-dr-michele-gazzola-university-of-ulster-gb/>

La dekanano enkondukis la sciencan prelegon.

Ilona Koutny

Desegnofilmoj gajnis la atenton de ĉinaj studentoj


Hodiaŭ (okt 18) mi prezentis miajn filmetojn en Esperanto (la desegnofilmon "Saĝa Steleto", "La lumo de la estonto" por la Usona Filmfestivalo kaj la okan parton de la Homa Ĉeno laŭ la ideo de Max Garcia) al 150 gestudentoj de la Departemento de Fremdaj Lingvoj de Zaozhuang-Universitato. Du el miaj Esperanto-studentinoj venis por filmi la eventon, kiu estis hibrida kaj la kvara evento de la celebrado por la dekjariĝo de la Esperanto-Muzeo. La studentoj estis interesataj kaj restis ĝis la fino, eĉ se la respondeca instruisto devis iri al alia kunveno. Ili precipe ŝatis la desegnofilmon kaj la Homan Ĉenon, kiun ili trovis tre kolora. Mi iom enkondukis Esperanton kaj instruis al ili kelkajn salutojn kaj simplajn frazojn, demandante al ili, pri kio ili scivolemas (Vi estas belega. Ĉu vi havas koramikojn? Ĉu vi jam manĝis? ktp).

Alessandra Madella

Afiŝo de la UK en Torino

En 2023 la grandrenoma itala kongreso ne necesis, ĉar la 108-a UK en Torino pli ol sufiĉis. Jen dekstre la profesi-aspekta afiŝo por la UK en Torino.

Nova hejmo por la arkivo de UEA



La arkivo de UEA iris al du lokoj, kie ili povos esti prizorgitaj kaj analizitaj de profesiaj katalogistoj. Parto iris al la Ŝtata Muzeo de Vieno, la alia parto al pola biblioteko ĉi tie bildigita.



Ambaŭ eroj de Barbara Pietrzak

===== vortoj: 1130 =====

La kolekto de EKO por 2023: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 50).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunajo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/> .:

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj. **Iris al kontrolo okt 21.**